
**ok |**

## ◢Miks-

**En 2014** griza afrikdevena papago nomata Nigel forflugis el sia hejmo en Kalifornio. Lia posedanto nomiĝis Darren Chick, britulo, kaj Nigel bone *parolis* la anglan kun brita akĉento. Kiam ĝi fine estis trovita, post kvar jaroj da serĉo, la papago ne plu parolis la anglan sed la hispanan. Flue...



**Leonardo da Vinci**, en la 5a jc. eltrovis, ke estas la sango kaj ne la aero kiu igas la penison erektiĝi laŭ oni kredis dum la Antikveco.

**La t.n. nomata *Hispana Gripo*** (1918-19), kiu laŭ de fidindaj statistikoj mortigis inter 20 kaj 40 milionoj da homoj en la tuta mondo, ekaperis en Kansas, Usono. Ĉar Hispanio restis neŭtrala dum la 1a Monda Milito, okazanta samepoke, kaj ties gazetaro estis pli libera, ekaperis tie la unuaj informoj pri la pandemio, kiuj jam estis kaŭzantaj multajn mortojn en aliaj eŭropaj landoj. Pro tio la nomumo...

**La esperanta** sinsekvo *la virino kies filinon mi vidis hieraŭ* en la ĉina kaj japana estas la jeno: (*ties filinon mi hieraŭ vidis*)-*a virino.*

**El la libro** *Tingo:* o *Irresistível Almanaque das Palavras que a Gente não tem*, de Adam Jacot Boinod (eldonejo Conrad):
*Olfrygt* – el la dana: *timo manki biero*
*Catra patra* – el la turka: *fuŝe paroli lingvon*
*Bakkushan – el la japana: bela virino dorse vidata*
*Kummerspeck* – el la germana: *pezo kiun oni akiras kiam ekmanĝadas pro deprimo*
*Yugen* – el la japana: *konscienco pri la Universo kiu vekas tro profundajn kaj misterajn sentojn por esti esprimataj per vortoj*
*Mokita* – el la *kiwana* (Papuo-Nov-gvineo): *la vero pri kiu ĉiuj scias sed pri kiu neniu volas paroli*
*Koro – el la japana*: *timo, ke la peniso estas mallongiĝanta enen de la korpo.*

**Jen listo** de la plej venditaj libroj ĉe la libroservo de UEA en 2018: 1. *Poŝamiko* 2. *Pasporta Servo 2017*. 3. *Internacia Kongresa Universitato 2018* 4. *La Danĝera Lingvo* 5. *Beletra Almanako 30* 6. *Beletra Almanako 31* 6. *Faktoj kaj Fantazioj* 7. *Gerda Malaperis!* 8. *Nia Diligenta Kolegaro* 9. *Antaŭ unu Jarcento* 10. *Beletra Almanako 32* ●

# [G H

# Gaja Haveno|

41
Porto Alegre, RS, Brazilo
Majo 2019



## La kruela morto de Hipatia, la unua matematikistino en la Historio

www.gajahaveno1.blogspot.com

# Gaja Haveno

Redaktas César Dorneles Soares
dornelespoa@gmail.com
Eldonoj sur interreto: www.esperantors.net.br/
gajahaveno

## ◢Uverturo

### Fernando Pessoa kaj la faŝismo



“La ĉefa verko de la faŝismo estas la plibonigo kaj organizado de la fervoja sistemo. La trajnoj nun bone iras kaj alvenas ĉiam akurate. Por ekzemplo, vi vivas en Milano; via patro vivas en Romo. La faŝistoj mortigas vian patron, sed vi havas la certecon, ke enirinte en la trajnon, vi alvenos ĝustatempe por la enterigo.”

### Simptomoj

“Ne ekzistas naturmediaj problemoj. Ekzistas nur naturmediaj simptomoj de homaj problemoj.” (Robert Gilman)

### La ĉefa obstaklo al Esperanto

“Jen unu demando estas aktuala: Kio estas la ĉefa obstaklo sur la vojo al la akcepto de la internacia lingvo? Respondo ne estas facila. Plej evidentas, kompreneble, politika kontraŭstaro kaj ĝenerala inerto. Tamen, supozeble, la ĉefa rezisto kontraŭ oficiala enkonduko de la internacia lingvo estas antaŭ ĉio psikologia; la publiko eĉ subkonscie komprenas, ke ĝi malfortigos la naciajn lingvojn. Kaj ĉar la homoj agas pli laŭ emocio ol laŭ racio, ili plue rifuzos internaciigi sian menson  dum la ligoj kun la naciaj lingvoj tiel emocie ŝarĝitaj kiel estas nun.” (B. Ragnarsson, en la *artikolo La ĉefa obstaklo al Esperanto estas psika*, publikigita en Esperanto feb/1971)

### Aŭdaca fido

Estos momento en kiu la leĝero de la espero transformiĝos en la lacecon de la malespero. (...) Sed ni akceptos la malfacilaĵon kaj la doloron tiajn kiaj ili estas. Ni devas marŝi direkte al la tagoj kiuj venos kiel aŭdaca fido en la estonteco. (Martin Luther King) ●

## ◢Leksiko



### Senco/ sento/ senso

**Senco** – **a)** Maniero kiel vorto aŭ frazo estas komprenota: *la senco de ambaŭ vortoj estas malsimila*. **b)** = sencumo: direkto, precipe en la kazo en kiu estas nur du direktoj eblaj, ĉu laŭ longe de rektp, ĉu laŭ cirklo: la senc(um)o de la horloĝo. Portugallingve: *sentido*.

**Sento – a)** Agrable aŭ malagrable konsciata sensaĵo: *ŝi havis la senton kvazaŭ ĉio en ŝi konsumiĝis*. **b)** Agrable aŭ malagrable konsciata sensaĵo: *lia vizaĝo povis laŭvole esprimi ĉiujn sentojn*. **c)** Neintelekta, iu instinkta kapablo taksi la aferoj, juĝi la homojn: *formo, kontraŭ kiu protestis nia lingva sento*. (Z). Portugallingve: *sentimento*.

**Senso** – **a)** Korpa kapablo de la animaloj (inkluzive homon), plimalofte de vegetaĵoj, per kiu ili rivevas sciigojn pri iaj elementoj, fizikaj aŭ kemiaj, de la eksteran medio, de la  interno de la korpo k de ties ekvilibro en la spaco: vidado, aŭdado, flarado, gustumado kaj tuŝado. **b)**  Kapablo percepti ion kvazaŭ per iu senso: plezuroj de la sensoj, *humura* senso. Portugallinve: *sentido, senso*. ●

Fonto: PIV



## ◢Humuro



Homo sin direktas al la plej multekosta advokato en la urbo.
- Mi scias, ke vi estas multekosta advokato, sed ĉu mi povas fari al vi du demandojn kontraŭ 1000 realoj?
La advokato respondas:
- Kompreneble! Kiu estas la dua?
●

## ◢Tempotunelo

En aŭgusto 1993 okazis baza kurso de E-o en São Sebastião do Caí sub la respondeco de Instr. Nilce Maria Rodrigues ĉe la Sociedade Espírita Allan Kardec. Por la diskonigo de la kurso estis aranĝita prelego pri la lingvo ĉe la E.E. de 1º Grau São Sebastião, em kiu prelegis George Otto Vaske kaj la menciita instruistino. En la okazaĵo estis programata alia kurso ĉe Centro de Línguas Michigan tiuurbe. ●

# ◢Kafpaŭzo



César Dorneles

## MARIELLE

Oni mortigis Marielle, sed ne ŝiajn ideojn, kiuj estis imunaj al la kugloj de tiuj kiuj jam estas mortintaj sed ne scias.

## KIALO

Ne, ne temas pri esperantlingva retejo sed anglalingva... Ĉu eklezioj devus pagi impostojn? Ĉu estas limoj por la esprimlibereco? Pri tiaj aferoj kaj multaj aliaj kiuj estas favoraj? Kontraŭaj? Pere de kiaj argumentoj? *Kialo* estas socia reto por iu ajn debato (pri scienco, filozofio, politiko, genro, religio...) en kiu la komentoj estas organizataj kaj voĉdonitaj. Ĝi adresas ĉe *www.kialo.com* kaj ankaŭ havas paĝon en Facebook. Kurioza nomo, ĉu?...

## PRODUKTECO

En la lastaj jardekoj, la spekulaciaj investoj kreskis inter 7% k 9% en la mondo dum la investo sur produktado pri varoj kaj servoj kreskis inter nur 2% k 2,5%. De tio rezultiĝas ke nuntempe 1% de la homoj koncentras liamane pli da riĉaĵoj ol la aliaj 99%. Donitaĵojn kiun mi legis en la revuo *Le Monde Diplomatique-Brasil* plej precize en la artikolo *Um pouco de bom senso, "por dios"!*, de Ladislau Dowbor. Temas pri la kapitalismo perdanta sian ĉefan sinpravigon: la produktecon.

Alie la portugallingva versio de *Le Monde Diplomatique* estas unu el la tre maloftaj periodaĵoj troveblaj en la revubudoj kiuj vere indas esti legataj por homoj minimume politike konsciaj. Mi rekomendas ĝin. ●

# ◢El la legantoj

Mi dankegas al vi pro la sendo de la bulteno Gaja Haveno. Al mi tre plaĉis la artikolo pri la arboj.

(**Cleonice de Lima Rodrigues**, Porto Alegre)

# ◢La morto de Hipatia



César Dorneles

Aleksandrio, marto 415 p.K. Grupo da kristanoj baris la vojon de la kaleŝo de bela virino. Laŭ la Historio, *ŝi estis retirita de la veturilo, trenita ĝis preĝejo kaj senvestigita. Oni ne scias ĉu ŝi estis bategita ĝismorte aŭ senhaŭtigita ankoraŭ vivanta. Post ŝi estis distranĉe mortigita kaj bruligita.*

Ŝia nomo? Hipatia, helena filozofino kaj instruistino - konsiderata la unua matematikistino en la mondo. Ŝi estis filino de Teono el Aleksandrio, greka matematikisto kaj astronomo, la lasta direktoro de la t.n. dua Biblioteko de Aleksandrio. Li respondecis pri ŝia edukado pri matematiko, filozofio kaj astronomio.

Komence de la 5a jarcento de nia erao, Aleksandrio, fondita de Aleksandro la Granda en 531 a.K., estis centro de kulturo kaj lernado en la Romia Imperio kaj vivis la epokon de transirado inter na pagana kaj kristana mondoj. Hipatia tuj distingiĝis kiel virino ▶



**Pensoj de Hipatia**

Ĉiuj dogmaj religiaj formoj estas malveraj kaj ili ne devas esti akceptataj pro persona memrespekto.

Kompreni la aferojn kiuj ĉirkaŭas nin estas la plej bona preparo por kompreni tion pli foran.

Regi enkatenigante la menson pere de la timo pri puno en alia mondo estas tiel malnobla kiel uzi la forton.

Subtenu vian rajton pensi, eĉ mispensi estas plibone ol ne pensi.

Instrui superstiĉojn kiel verojn estas unu el la plej teruraj aferoj.

de granda klereco, superinte la matematikajn konojn de la propra patro. Oni atribuas al ŝi la inventon de la astrolabo kaj de la hidrometro.

Sed bedaŭrinde ŝi devis fronti la konfliktojn de ideoj inter paganoj, kristanoj kaj judoj kaj kompreneble ŝia ineco estis kialo de antaŭjuĝoj, precipe ĉe la kampo de instruado. Malgraŭ la fakto, ke ŝi estis tre estimata de la kristana komunumo en la urbo, ŝi gajnis severan kaj netoleremán kontraŭulon: Cirilon,la episkopon de la eklezio de Aleksandrio.▶

Feliĉe Hipatia estis protektata de Orestes, la guberniestro de Aleksandrio, kiu estis aliflanke tre tolerema kristano. Historiistoj kredas, ke li kultivis amikecon kun ŝi ĝuste por plifortigi siajn interrilatojn kun la nekristana komunumo.

Tiaj pozitivaj interrilatoj inter la du tute ne plaĉis al multaj kristanoj ĉar ili timis, ke tio malfavoris al pli bona komprenemo inter Orestes kaj Cirilo. Oni kredas, ke la disputoj inter la guberniestro kaj la episkopo estis la fono por la kruela destino de Hipatio. Kristanaj partianoj de Cirilo respondecis pri ŝia mortigo. El tio rezultis inkluzive la decido de Orestes post nelonge rezigni pri lia posteno kaj forlasi la urbon. ●

Fontoj:

O mistério da morte de Hipátia, a primeira matemática da História – https://www.bbc.com/portuguese/geral46501897?fbclid=IwAR1FeJO4d1hBRdsJu1anJbDIXECtUrQCtIJy0XhtW4X3tlfjwXiuH-yUpmA


https://eo.wikipedia.org/wiki/Hipatia

https://pt.wikipedia.org/wiki/Orestes_(prefeito_do_Egito)

## ◢Matilda




## ◢Onidire




Ĝis kiam mi estis 13jara mi pensis, ke mia nomo estis *Silentiĝu*. (**Joe Namath)**

Se mi estus iomete pli humila, mi estus perfekta. **(Ted Turner)**

Mi ne havas 50 jarojn. Mi havas 18 kun 32 da sperto! **(Steven Tyler)**

Tri frazoj por faciligi la vivon:
- Tenu ĝin por mi.
- Tio jam estis tia kiam mi alvenis.
- Bone pensita, ĉefo! **(Homer Simpson)** ●



ESPERANTOMOVADO

## ◢Sylla Chaves

**La 30an de majo, 2009**, forpasis en Rio-de-Ĵanejro Prof. Sylla Chaves, 79jara, unu el la plej eminentaj figuroj de la E-Movado ne nur brazila sed internacia. Naskiĝinte en Sant'Ana do Livramento, RS, de longa tempo li vivis en Rio. Li diplomiĝis pri Juro (UFRJ) kaj fariĝis magistro pri Komunikado (Universitato de Stanford, Usono), Politika Scienco (Universitato de Parizo) kaj Kibernetika Pedagogio (Universitato de Paderborn, Germanio). Profesie li estis profesoro pri Socia Komunikado kaj interrilatigitaj lernoobjektoj ĉe la Lernejo pri Publika Administrado de la Fondaĵo Getúlio Vargas. Li laboris ĉe la sekretariatoj de UN kaj Unesko kaj ankaŭ estis ĵurnalisto kaj poeto. ▶



## ◢Juvenalo legas ĵurnalon




Kiel esperantisto, li estis aŭtoro de multaj didaktikaj verkoj pri E-o, eksa prezidanto de BEL-Brazila Esperanto Ligo (1978-1982), membro de la Akademio de Esperanto kaj de la Internacia Scienca Akademio (San-Marino). ●

Fonto:
https://pt.wikipedia.org/wiki/Sylla_Chaves